Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

25-a Jarkolekto * Septembro 2009 * N-ro 85

ISSN 1576-06



AYAMONTE

La rivero Gvadiano plen-aĝiĝas ĉe la Atlantika Oceano

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio 3
15-a Andaluza Kongreso de Esperanto 8
Paĝoj pri Nia Historio 9
La stelo kiel simbolo en la andaluzaj municipaj blazonoj. La blazono de Pegalajar (Jaeno) 10
Flamenko 18
Eksterordinaa Ĝenerala Asembleo de AEU 20
Nova Libro eldonita en Hispanio.....23
Lingva Angulo 25
Andaluza Kuirarto.....27
Vort-Ludoj 28
Libro-servo de AEU 29
Turismi en AYAMONTE 30
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio 34
Humoro 35
Poezio 36

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



➢ MALAGO


La pasintan 12-an de decembro 2009-a la malaga esperantistaro festis la Zamenhofan Tagon. Memoru, ke ĉirkaŭ la 15-a de decembro, la tutmonda esperantistaro festas la inicianton de nia interncia lingvo kaj pro tio tra la tuta mondo oni okazigas specialajn renkontiĝojn. En Malago, kiel dirite, tio okazis la pasintan 12-an de decembro ĉe la Junulara Gastejo. Ĉeeestis 12 malaganoj kaj 3 sevilanoj, plus niaj kara slovenaj gesamideanoj Danica kaj Djorge Obradovic. La renkontiĝo komenciĝis per la spektado/aŭdado de "Ho mia kor", bela poezio de L.L. Zamenhof, kantita dolĉvoĉe de Neide Barros. Sekvis prelegeto de Danica Obradovic pri Esperanto en Maribor, ŝia hejmurbo, kun speciala mencio al la E-ekspozicio okazinta junie 2009-a en Lent, la malnova kvartalo de Maribor kaj la rivero Drava.

Post la parolado de Danica sekvis projekciado de desegno-filmo en esperanto, krome tre facile komprenebla dank' al la subtitoloj. Ĉe la junulara gastejo mem okazis bankedo en agrabla etoso ksj poste ĉiuj kafumis. Dum vespere oni kontaktis pere de la sistemo Skajpo kun Aŭgusto Casquero, valencia samideano troviĝanta nun en Ĉinio kie li estas intruisto. Fine, oni projekciis la filmon "Angoro", la unua filmo produktita tute en esperanto en kiu oni rakontas krimon ĉe la Pariza periferio. La Zamenhofa Tago en Malago finiĝis per la adiaŭo al la sevilaj gesamideanoj kiuj ĉeestis la feston.



➢ TINDOUF

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kontaktis antaŭ kelkaj monatoj kun UJSARIO, la junulara sekcio de la Fronto Polisario, organizo konsiderata de Unuiĝintaj Nacioj kiel reprezentanto de la sahara popolo. La deziro de la andaluza sekcio estas disvastigi kiel eble plej efike la internacian lingvon ankaŭ ĉe la rifuĝintaj kampadejoj de la sahara popolo, troviĝantaj en la zonoj ne okupitaj de Maroko kaj ĉe la dezerto Tinfouf en Alĝerio, la teritorio estas eksa hispana kolonio en la nordo de Afriko. Krom la helpo por la aperigo de esperanto-sahara TTT-paĝo en interreto, legebla en *www.sahara-esperanto.ueuo.com* , nia ĉefa apogo estas la dissendo de deko da libro-metodoj de la internacia lingvo en la araba kaj vortaroj Esperanto/Araba al tiuj kampadejoj. Tiun projekton ni jam plenumis antaŭ kelkaj semajnoj. Do, jam troviĝas en kvin kulturaj centroj de la rifuĝintaj kampadejoj de la sahara popolo lerniloj de la esperanto-lingvo. Espereble ili utilos por disvastigi nian lingvon eĉ en la plej arida dezerto.





En esperanto kaj en la araba lingvoj estas eble
legi novan TTT-paĝon pri Okcidenta Saharo kaj Esperanto
kuneldonita de *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*
ĉe www.sahara-esperanto.ueuo.com

➢ KORDOVO

Inter la 26-a de oktobro kaj la 18-a de decembro 2009-a okazis en Kordovo ĉe la Palaco Viana, ekspozicio montranta pli ol 200 fotografaĵojn faritaj de Rafael Señán, organizata de la ŝparkaso CajaSur, al kies fondaĵo apartenas la tuta kolekto de fotografaĵoj kaj negativoj de tiuj elstara fotografisto. Rafael Señán González naskiĝis en Ciudad Real en la jaro 1911-a, kvankam tre june li foriris en Granadon, tie li laboris kiel fotografisto. Señán eldonis centojn da turismaj fotografaĵoj de Granado, Kordovo, Kadizo, Malago, Sevilo kaj Nord-Afriko. Sur kelkaj el la poŝtkartoj eldonitaj en Kordovo aperis la teksto en la hispana lingvo kaj en esperanto.

Indas diri, ke okaze de la 14-a Andaluza Kongreso de Esperanto, Kordovo-2008-a, la historia arĥivo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ekspoziciis ankaŭ sian propran kolekton de tiuj poŝtkartoj, tiuj sur kiuj aperas esperantlingva teksto. Laŭ informo ricevita tiu ekspozicio organizita de la ŝparkaso CajaSur vojaĝos tra aliaj andaluzaj urboj.




Poŝtkarto eldonita de Rafael Señán. Legeblas sur ĝi la teksto en esperanto: *Romana ponto kaj Katedralo*



Poŝtkarto eldonita. En esperanto legeblas la teksto: *Preĝejo de Sankta Nikolao*

➢ GRANADO

Ekde la monato oktobro 2008-a instruas la polan lingvon en la Fakultato pri Tradukado kaj Interpretado de la Universitato de Granado nia pola samideano MACIEJ JASKOT. En Pollando li estis instruisto pri hispana gramatiko kaj ene de la Esperanto-mondo li estas redaktoro de la esperanto-redakcio de Pola Radio. Okaze de la pasinta 68-a Hispana kaj 14-a Andaluza Kongresoj de Esperanto oni invitis lin prelegi pri Pola Radio.



95a Universala Kongreso de Esperanto

Havano, 17–24 julio 2010

La Universala Kongreso de Esperanto de la jaro 2010-a okazos en Havano (Kubo), sub la temo:
Interproksimigo de Kulturoj.

Pliaj informoj ĉe: www.uea.org

¿Crees que el Esperanto es una lengua que merece tu apoyo?

Seguramente siempre has pensado que la lengua internacional esperanto es una excelente idea y que merece el apoyo de todos. Si es así ¿No crees también, que nuestra lengua y el movimiento que tiene como objetivo difundirla en Andalucía merece tu ayuda y tu colaboración?

La Asociación Andaluza de Esperanto es una asociación cuyo principal objetivo es difundir la lengua internacional Esperanto en nuestra Comunidad. Algo hemos conseguido durante los más de 25 años de existencia de nuestra asociación... la organización de 14 congresos en los que el esperanto fue una lengua viva, 4 libros editados, la edición de revistas de aparición regular, numerosos cursos de aprendizaje de la lengua internacional, el mantenimiento de un sitio en internet donde se ofrece informacion sobre el esperanto y Andalucía...

¿Se necesita algo más? Sí claro ¡Tu colaboración! La Asociación Andaluza de Esperanto es una asociación donde trabajan voluntarios que no reciben ningún tipo de ayuda oficial, así que necesitamos la colaboración por medio de la afiliación de todos los que piensan que el esperanto es una idea que merece apoyo también aquí, en Andalucía.

Para ser miembro de la Asociación Andaluza de Esperanto tan sólo es necesario contactar con la misma por medio de la dirección de correo electrónico aeu @ esperantoandalucia . org La cuota anual para el año 2010 es de 20 euros que se pueden abonar en una de las siguientes cuentas:

- Caja General de Ahorros de Granada
  2031 0225 54 0100187657
- BBVA
  0182 4106 71 0207160717

Se ruega especialmente que, a la hora de abonar la cuota, se solicite al empleado del banco o de la caja de ahorros donde se efectue, que anote en el documento de pago tu nombre y la indicación "Cuota 2010".

GRACIAS, el movimiento esperantista en Andalucía merece tu colaboración.

15-a
ANDALUZA KONGRESO DE ESPERANTO
Jaeno, la 30an kaj 31an de oktobro 2010-a

Organizota de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj Jaena Esperanto-Asocio

La andaluza esperantistaro, kaj kompreneble parolantoj kaj simpatiantoj de la internacia lingvo loĝantaj kie ajn, estas invitataj ĉeesti kaj partopreni en la 15-a Andaluza Kongreso de Esperanto, okazonta en la urbo Jaeno la proksimaj 30-a kaj 31-a de oktobro 2010-a.

Kongresejo: Junulara Gastejo C/ Borja s/n Jaén.

Programo: Ankoraŭ ne decidita, verŝajne okazos projekciado de filmoj en esperanto, mallonga kurso de la internacia lingvo, diversaj prelegoj, babilado pri la nuntempa situacio kaj ontaj perspektivoj de la disvastigo de la internacia lingvo esperanto en Andaluzio kaj turismaj vizitoj al la tipa kvartalo Magdalena, kie troviĝas la kongresejo kaj al la mond-fama Jaena Katedralo. Kiel okazis en ĉiuj antaŭaj andaluzaj kongresoj la programo ne estos io fermita, sed ĝi estos tute malfermita al la partopreno kaj opinio de la ĉeestantoj.

Libroservo: Oni organizos standon dum la kongreso kie eblos aĉeti librojn en kaj pri esperanto.

Pliaj informoj aperos sur la proksima numero de la revuo, kie oni sciigos pri ebleco resti kaj manĝi ĉe la kongresejo mem, kompreneble ni informos pri la prezoj. Tamen, rezervu Vi jam sur Via kalendaro tiuj datoj, 30-an kaj 31-an de oktobro, por veni en Jaenon kaj ĝui la junan kaj agrablan etoson de la jaena esperantistaro. Kontaktu kun:

aeu @ esperantoandalucia . org
jaen @ esperantoandalucia .org


Esperanto en Jaeno



Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

La kerno de la nuntempa HEF-biblioteko



Ĝis la forpaso de la sevila esperantisto Trinidad Soriano, komence de la 20a jardeko de la pasinta jarcento, la Esperantista Grupo de Sevilo estis tre aktiva. Dank'al li, la grupo sidejis ĉe prestiĝa kulturcentro en la centro de la urbo, la *Sociedad Económica de Amigos del País*. Tie okazis la renkontiĝoj de la grupo, la kursoj kaj kompreneble troviĝis tie esperantista biblioteko.

Antaŭ la civila milito kvankam la sevilja grupo iomete agadis, verdire ĝi ne estis tiel aktiva kiel dum antauaj jaroj. La pelj grava okazintaĵo ĝis tiam estis la organizado de Hispana Esperanto-Kongreso en la jaro 1929. Post la milito nur 2 aktivaj samideanoj troviĝis en Sevilo: Rafael Fiol Paredes kaj Carlos Martinez Fernández, la neforgesebla Karolo.

Pri Rafael Fiol ni jam parolis sur antaŭaj numeroj de la revuo. Li estis prestiĝa militisto kiu neniam kaŝis sian esperantistecon, eĉ ne kiam tio povus esti danĝera, kiel dum la unuaj jaroj de la frankisma reĝimo en Hispanio. Karolo Martinez estis fervojisto, li laboris ĉe la sevila stadidomo kaj dum multaj jaroj li instruis la internacian lingvon en Sevilo.

Post la ĉeso de ĉiu ajn esperanto-agado en Sevilo, Rafael Fiol fariĝis la deponanto de ĉiuj posedaĵoj de la jam ne-ekzistanta grupo, inter ili de la biblioteko de la asocio kolektita dum pli ol 20 jaroj. Ĉe li estis la libroj atendantaj pli bonajn jarojn por la disvastigo de la internacia lingvo.

En la jaro 1971, kiam ambaŭ sevilaj samideanoj estis preskaŭ okdekjaraĝaj, kaj pro la ne-ekzisto de esperantista grupo en Sevilo, ili decidis donaci la bibliotekon al Hispana Esperanto-Federacio. Temis pri 300 libroj eldonitaj pliparte inter la jaroj 1904 kaj 1912, do veraj juveloj de la literaturo eldonita en esperanto dum la unuaj jardekoj de la lingvo.

Tiu libraro estis la kerno de la nuntempa biblioteko de Hispana Esperanto Federacio kaj feliĉe ankoraŭ ili estas konsultebla ĉe la Hispana Esperanto Federacio en Madrido.

La Stelo kiel simbolo en la andaluzaj municipaj blazonoj.

La blazono de Pegalajar (Jaeno) (*)

José María Rodríguez Hernández

La municipaj blazonoj aperas en Andaluzio post la konkero de urboj kaj vilaĝoj fare de la kristanaj duon-insulaj regnoj al la araboj, kiuj estis en la Ibera Duoninsulo ekde la jaro 711-a. Tiam la kastiliaj reĝoj donis la ĵus konkeritajn urbojn kaj vilaĝojn al la feŭdaj sinjoroj aŭ al militaj ordenoj. Kutime la blazonoj de tiuj vilaĝoj estis similaj al tiuj de la sinjoroj kiuj regis ilin. En aliaj kazoj aperis sur la blazonoj elementoj komunaj al la kastilia kaj leona regnoj, tiel estas tre normale vidi sur la andaluzaj municipaj blazonoj leonojn kaj kastelojn. La celo de ĉi tiu malgranda eseo estas studi simbolon aperanta sur kelkaj blazonoj: *la stelo*, kompreni ĝian signifon, scii pri ĝia origino kaj vidi kiamanere oni reprezentis ĝin.

Kvankam ĝi aperas sur kelkaj municipaj blazonoj la stelo ne estas ofta elemento en la andaluza heraldiko. En Andaluzio ĉefe aperas kasteloj, krucoj kaj leonoj. Ekzemple, ni vidu la jenan statistikon de la blazonoj de la provinco Jaeno.

- Kasteloj aperas en la 70% el la municipaj blazonoj.
- Krucoj en la 45%.
- Leonoj en la 28%.
- Steloj en la 2%.

Signifo de la Stela simbolo

La unua signifo de la steloj en heraldiko estas reprezenti la ĉielajn astrojn. Tiel, la astroj estas reprezentataj en kelkaj municipaj blazonoj, kaj tio okazas ne nur en Andaluzio. Ni pripensu la madridan urban blazonon, kie aperas urso, arbo kaj sep steloj, tiuj steloj estas la konstelacio de la Malgranda Ursino. En Andaluzio ni trovas ĉielajn astrojn, ekzemple, en la blazonoj de:


(*) ĉi tiu artikolo aperas kiel ĉapitro en la libro *"Junto a un Olivo Centenario / Apud Centjara Olivarbo"*, libro omaĝe al S-ro Alfonso Escamilla Roa, eldonita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo en la jaro 2007-a. Memore al nia ne-forgesebla jaena samideano, ni aperigas la artikolon sur ĉi tiu numero de nia revuo.

CARMONA

En la blazono de ĉi tiu sevila vilaĝo aperas ok-pinta stelo, pli konata kiel *Vesper-stelo*, reale ne temas pri stelo sed ja pri la planedo Venuso. La devizo de la urbo klarigas la signifon de la stelo: *Kiel la vespera stelo brilas en la ĉielo, tiel en Andaluzio Carmona*



Carmona



Fuengirola

FUENGIROLA

Sur la blazono de Fuengirola, vilaĝo de la provinco Malago, aperas kvin-pinta stelo kiu reprezentas la stelon Kanopon. La araboj pensis, ke la sola loko en la Ibera Duoninsulo kie eblis vidi ĉi tiun stelon estis la kastelo de Fuengirola.


Alia kompreno de la stelo aperanta sur la andaluzaj municipaj blazonoj havas religian signifon. Tradicie la Virgulino Maria estis reprezentata de stelo, ĉi tiu kutimo devenas de la biblia libro Apokalipso, ke eblas legi sur la dekdua ĉapitro... *Kaj granda signo vidiĝis en la ĉielo: virino vestita per la suno, kaj la lumo sub ŝiaj piedoj, kaj ŝia kapo krono el dek du steloj.*

Tiun reprezenton de la Virgulino Maria eblas vidi en la blazonoj de Villa del Río, vilaĝo de la provinco Kordovo, kie aperas ponto super la rivero Gvadalkiviro kaj kvin-pinta stelo reprezentanta la Virgulinon de la Stelo, kiu laŭdire aperis en tiu vilaĝo en la 15-a jarcento. Same alia stelo videblas en la blazono de la onuba vilaĝo Chucena, ankaŭ kiel simbolo de la Virgulino de la Stelo. Krom la kristina signifo, la stelo, ĉi-foje ses-pinta, estas la simbolo de la juda popolo. La vilaĝo Lucena, en la kordova provinco, estis ĝis la forpelo de la judoj el Hispanio en la jaro 1492,


grava setlejo de judoj en Andaluzio,kaj tiel la nuntempa municipa blazono, elstaras ĉi tiun historian karakteron de la urbo, aperigante ses-pintan stelon.



Chucena



Villa del Río



Lucena

La stelo, aŭ pli bone dirite *multaj steloj*, signifas riĉecon kaj prosperon. En la blazono de la kordova urbo Cabra aperas kapraro ĉirkaŭigita de steloj, ĝia signifo: la urbo reprezentita de la kaproj estas loko plena je riĉeco.

Reprezentado de la Stelo

Sur la libro de Vicente de Cadenas y Vicente, dekano de la Reĝa Armil-Korpo, *Manual de Vexilología*, estas eble legi:

<< La stelo estas heraldika elemento kie eliras kvin pintoj aŭ radioj. Se pliaj radioj estos necese indiki ĝin.>>

Pro ĉi tiu aserto estos eble pensi, ke la plej uzata stelo en Heraldiko estas la kvin-pinta stelo, kaj post la aserto de tiu elstara heraldikisto aliaj aŭtoroj opinias same. Tamen, en Heraldiko la kvin-pinta stelo estas origine nord-eŭropa sed ne hispana. Pro tio estas eble aserti, ke tiu opinio de S-ro Cadenas Vicente rilatas pli al la Veksilologio, helpa historia scienco studanta la standardojn, ol al Heraldiko, historia scienco studanta la blazonojn. En la hispana tradicio eblas vidi, ke la plej uzata stelo estas tiu ses-pinta, do, se oni nenion diras pri la nombro da pintoj aŭ radioj ĉe blazono, tiuj estos ses. Alia afero estas la fakto, ke la plej uzata stelo sur la standardoj estas la kvin-pinta stelo. Ni memoru, la aferon pri la aŭtonom-komunuma standardo de Madrido, bazita sur la ses-pintaj steloj kiuj ĉirkaŭigas la urson de la madrida blazono, sed definitive kvin-pintaj sur la standardo.





Blazono de la urbo Madrido kaj standardo de la aŭtonom-komunuma Madrido. La originaj ses-pintaj steloj fine devenis kvin-pintaj.

En la municipaj blazonoj de Andaluzio la plej ofta nombro da radioj en la stelo estas SES, escepte de tiuj, kompreneble, kiuj reprezentas ĉielajn astroj, kiel la antaŭe vidita blazono de Carmona, kie la stelo havas ok pintojn. Kurioza la afero pri la blazono de Villa del Río en Kordovo, ankaŭ antaŭe vidita, la teksto aprobanta la blazonon diras tiel:

<<ĉirkaŭigita de leonoj kaj kasteloj aperas la rivero Gvadalkiviro kaj ora ponto. Super ĝi ok-pinta stelo el arĝento.>>


Tamen, kiam oni vidas la blazonon de Villa del Río, sur ĝi la stelo ĈIAM estas kvin-pinta, malgraŭ la oficiala teksto. Kiel dirite, la stelo reprezentas la Virgulinon de la Stelo. La oficiala aprobo de la blazono okazis antaŭ malmultaj jaroj, konkrete en la jaro 1970, tiam, kvankam bazita sur historia ok-pinta stelo, videbla ĉe la Preĝejo de la Virgulino de la Stelo, la teksto oficialigas tiun ekzistantan stelon, tamen la ofta reprezentado de la blazono aperigas kvin-pintan stelon, pli normala en la ĉiutaga vivo, ĉar ĝi aperas sur multaj standardoj.

LA BLAZONO DE PEGAJALAR (Jaeno)

La 25-an de majo 2006-a la Urbodomo de Pegalajar, vilaĝo en la andaluza provinco Jaeno, aprobis la informon ellaborita de la elstara tiuvilaĝa historiisto S-ro Juan Antonio López Cordero, enhavanta proponon prezentota antaŭ la Andaluza Registaro pri la blazono kaj la standardo de ĉi tiu jaena vilaĝo. Kiel asertas S-ro López Cordero, la informo prezentas ne-novan blazonon, ĉar ĝi jam aperas sur la kovrilo de la Ĉarto de Privilegioj

donita al la vilaĝo de la reĝo Filipo la 3-a en la jaro 1599. La propono pri la blazono tekstas jene:

<< Blazono dividita. Dekstren sur ruĝa fono aperas ora kastelo kun tri turoj, kvin fenestroj kaj pordo. Super ĉiu turo estas arĝenta stelo, kvarpinta tiu super la dekstra turo, ses-pinta la centra stelo kaj ok-pinta la maldekstra. Maldekstren aperas ruĝa leono kronita sur arĝenta fono.>>



Blazono de Pegalajar

La aŭtoro de la projekto diras jenon pri la steloj troviĝantaj super la kastelo:

<<La inkludo de la steloj, kvar-, ses- kaj ok-pinta, aperanta ene de la propono pri nova blazono, baziĝas sur la blazono de la tri-tura kastelo aperanta sur la Ĉarto de Privielegioj. Ĉi tiuj steloj estas antikvegaj simboloj aperantaj post la Kristanismo. Ili povas indentigi sin al Jesuokristo en la kruco; al la Patro kaj al la Virgulino Maria. La situo de la tri steloj super la turoj de la kastelo signifas la dian protektadon sur la fortreso de Pegalajar, ĉar estas necese diri, ke la milito kontraŭ la araba regno Granado finiĝis nur sesdek jaroj antaŭe kaj Pegalajar estis landlimo inter la kristana kaj la araba regno dum tri jarcentoj…


La kvar-pinta stelo estas la simbolo de la suno, de la dio "ŝamaŝ" en Mezopotamio aperanta en la babilonaj "kudurus", ankaŭ en la maja kulturo, kiel pruvas la Kodo de Dresdo, temas pri universala hieroglifo prenita el la kristana simbolaro, kiu identigas ĝin al la kruco de Kristo. La ses-pinta stelo, aŭ Davida Stelo, estas simbolo tre disvastigita en la kulturoj juda kaj kristana, reprezentas la interagadon de la dia ento kaj la teraj entoj. La ok-pinta stelo aperas en Babilonio reprezentanta Venuson, ĝi apartenis al unu

el la tri bazaj astraj religioj, kaj tiam kaj poste oni identigis ĝin al la pluvado, al la fekundeco kaj al la erotismo. Sama interpreto realiĝis en la maja kulturo kaj en Egipto oni asociis la ok-pintan stelon al Siriuso kaj al la inundadoj de la rivero Nilo. La steloj estas la sola grava diferenco inter la proponita blazono kaj tiu kiu estas uzata de la Urbodomo.

Jesja, la de ĉiam uzata, sed ne-oficiala, blazono de Pegalajar, aperigis tri stelojn sed ĉiuj ses-pintaj.

La celo de ĉi tiu eseo estas serĉi kaj kompreni la signifon de la dekstra parto de la pegalajara blazono, kaj ĉefe la signifon de la steloj aperantaj super la turoj de la kastelo, do ni preterpason la maldekstran parton de la blazono, tie kie aperas ruĝa leono.

Kiel jam dirite de la D-ro López Cordero, la kastelo super kiu troviĝas tri steloj jam aperas sur la kovrilo de la Ĉarto de Privilegioj donita al la vilaĝo de la reĝo Filipo la 3-a. La elemento de la turo, kastelo aŭ fortreso estas ofta en multaj andaluzaj municipaj blazonoj. Ili aperas ne nur pro la fakto ke Andaluzio estis konkerata al la araboj de la kastilia regno, kaj tiu estis la ĉefa simobolo de Kastilio, sed ankaŭ ĉar tiu kastelo estas la reprezentaĵo sur la blazono de la vilaĝo mem. Do, kelkfoje oni aperigas ĝin por diskonigi la grandan lukton okazita antaŭ la definitiva konkero, tiam aperas maŭra reĝo aŭ luno ene de la kastelo, ekzemple sur la blazonoj de Montilla kaj Aznalcollar, ĉi-kaze la turo estas la kaptaĵo konkerita heroe al la malamiko.



Blazono de Montilla



Blazono de Aznalcollar


Alifoje, estas la kristana reĝo, nobelo aŭ la kruco mem tiu kiu troviĝas ene de la turo, tiam estas la fakto pri la regado, kiel povo devenita de la reĝo kaj do, de Dio mem, tiu kiu estas diskonigata de la blazono. Ekzemple, la blazonoj de Montemayor, Cantillana aŭ Utrera.

Se jam komprenita la signifo de krucoj, soldatoj, lunoj kaj reĝoj en la blazonoj, ni povas demandi, kion signifas reale la steloj? Kaj ĉefe, kion signifas la tri steloj de la blazono de Pegalajar? Ĉar ne temas pri unu stelo sed ja pri tri malsimilaj, oni povas aserti, ke la signifo ne povas esti konkreta afero sed koncepto. D-ro López Cordero en sia klarigo pri la municipa blazono de Pegalajar, mencias tri gravajn figurojn de la kristana religio, tio estas: Dio Patro, Jesuokristo kaj la Virgulino María, kaj tio sendube povas esti tiel. Tamen aliaj teorioj eblas.

Kiel lerte klarigas D-ro López, la kvar-pinta stelo estas la simbolo de la suno, mi eĉ asertus, ke temas pri la matena suno kiu direktas sin el kvar kardinalajn punktojn aperanta en la religia simbolaro ekde la babilonaj tempoj.

Fronte al la kvar-pinta stelo troviĝas alia ok-pinta. Tradicie sep- aŭ ok-pinta stelo reprezentas la vesperan stelon, tio estas Venuso, memoru la blazonon de la urbo Carmona. Do, temas pri la unua stelo aperanta en la nokto kaj oni povas diri, ke post la apero de tiu stelo (reale planedo) la tago finiĝas.

Kion reprezentus la centra ses-pinta stelo? Cifera sinsekvo komencanta per la numero 4 kaj finiĝanta per la numero 8, necese situas en la centron la numeron 6. Do, se la tago komenciĝas per kvar-pinta stelo, simbolo de la naskiĝanta suno kaj finiĝas per ok-pinta stelo, simbolo de la vespera astro Venuso, evidente la centra stelo estas la simbolo de la duontaga suno, krome aperanta per la plej ofta simbolo de la stelo, tio estas: ses-pinta stelo. Pri la signifo de la tri steloj nur eblas konjekto, estas eble pensi pri la tempo-pasado tra la fortreso de Pegalajar, kiel garantio de forto kaj sekureco por Kastilio post la konkero de ĉi tiu grava fortreso. Ni memoru la devizon aperanta apud la jaena blazono: *guarda y defendimiento de los reynos de Castilla*, (gardo kaj defendo de la kastiliaj regnoj).



Sinsekvaj steloj super la fortreso de Pegalajar.
Eble la pasado de la tempo tra fidela urbo.

Sed tio kio ja veras, estas la fakto, ke la apero tiuj tri steloj en la blazono de Pegalajar estas ununura ĉe la municipa heraldiko de Andaluzio. Estas eble trovi divers-pintajn stelojn sur municipaj blazonoj, sed ne tri malsimilaj steloj en ununura blazono. Tiuj malsimilaj steloj jam aperis sur la kovrilo de la Ĉarto de Privilegioj de Pegalajar, sed jaron post jaro la tri steloj reprezentiĝis egalaj kaj tiel aperas diversloke en kelkaj monumentoj de la urbo. Jen la sola diferenco de la projekto prezentita de la Urbodomo de Pegalajar, ellaborita de D-ro López Cordero, tamen ĉi tiu ŝanĝo ne estas novaĵo ĉar ĝi havas fortajn kaj klarajn originojn.

Memore al Instruisto S-ro Alfonso Escamilla Roa,
kiu tiom da amo dediĉis al Pegalajar.



Alfonso Escamilla Roa
1912 - 2007

- Nacia Instruisto
- Esperantisto ekde 1931
- Fondinto kaj unua direktoro de la muzik-bando de Pegalajar (Jaeno)
- Pentristo, li kunlaboris en la restaŭrado de pentraĵoj en preĝejo de Pegalajar.
- Ofta kunlaboranto, inter aliaj temoj pere de artikoloj rilate esperanton, de la ĵurnalo *JAÉN.*
- Preleganto pri la internacia lingvo kaj organizanto de kursoj de esperanto.
- Senĉesa propagandanto de esperanto kaj ĝia movado.
- Membro de diversaj E-organizoj, inter ili de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, ĝis sia forpaso.

Omaĝe al li Andaluzia Esperanto-Unuiĝo eldonis libron en la jaro 2007, vidu paĝon 29-an.

FLAMENKO

La Flamenko kaj la romantikaj vojaĝantoj

Komence de la 19-a jarcento alvenas en Hispanion amaso da vojaĝantoj, ili estas konataj kiel "romantikaj vojaĝantoj". Verŝajne tio ŝuldiĝis al la antaŭa alveno en la Iberan Duoninsulon de la franca kaj brita armeoj kiuj luktis ĉi tie kelkajn jarojn antaŭe okaze de la napoleona invado de Hispanio kaj Portugalio. Kiam Napoleono estas definitive venkita, kelkaj soldatoj kaj oficiroj revenis en Hispanion tiufoje kiel turistoj.

Estis Andaluzio la lando kiu pli profunde ilin impresis. *Théophile Gautier* skribis okaze de sia vojo en Andaluzion: *"Trans Siero Morena kaŝiĝas la surtera paradizo revata de ni".* Kaj Richard Ford eĉ skribis: *"ĝis revido kara Andaluzio, tiuj kiuj iras norden ŝanĝas la paradizon per dezerto."*

Tiuj romantikaj vojaĝantoj ekenamiĝis al la flamenko. Al ili impresis la ekzotismo de la pasia kaj akceptema Andaluzio, kie la flamenko estas la plej aŭtentika popola esprimilo. La romantikuloj parolas pri tiuj ciganoj de la granada Sakromonto, loĝantaj ĉe kavernoj ĉirkaŭigitaj de nopaloj kiuj kontraŭ kelkaj moneroj dancis kaj kantis kaj ludis gitarojn.



La franca Gustavo Doré desegnis ne nur la Biblion, Don Kihoto aŭ la Infero de Dante, li ankaŭ bildigis siajn impresojn pri sia vojaĝo en Andaluzio

Tiuj spektakloj oferitaj al la eksterlandaj vojaĝantoj okazis dum la "zambras", tiuj cigan-festoj, devenantaj de la maŭraj tempoj, kiuj estis familiaj renkontiĝoj kie la ĝojeco, kaj ankaŭ la malfeliĉaĵoj, esprimis sin pere de kantado kaj dancado. La kantaĵoj luditaj en tiuj zambras estas konsideritaj kiel la unua flamenka stilo, kaj tie naskiĝis la unuaj profesiaj artistoj, eble pro tio la Sakromontaj kavernoj ankoraŭ oni ĵonsideras kiel la lulilo de la nuntempa flamenka arto. Ekzistis tiam flamenkaj dancadoj konataj kiel la *albolá*, la *cachucha*, la

mosca, la *petaco*, la *merengazo* kaj la cigana tango.

Kiam la vojaĝantoj revenis en siajn landojn ofte ili publikigis vojaĝ-libron per kiu oni rakontis la vivitajn spertojn, tiel Andaluzio, Granado, la sakramontaj kavernoj kaj ĉefe la flamenko diskoniĝis tra la tuta Eŭropo, kaj eĉ en Usono, pere de la fama verkaĵo de Washington Irving, "Rakontoj de la Alhambro".


La ankaŭ konata libro "Vojaĝoj tra Hispanio" de Gustavo Doré eble estas la unua libro kie reprezentiĝis, pere de desegnaĵoj faritaj de la propra aŭtoro, scenoj de flamenka dancado.

Dank'al tiuj libroj ni konas la nomojn de tiuj unuaj flamenkaj artistoj kiel *El Fillo*, *La Andonda* kaj la legenda *Aurora La Cujiñí*. Naskiĝis tiam, meze de la 19-a jarcento, la legendo kaj la magio kiu ankoraŭ ĉirkaŭas la flamenkan arton.

T	L	A	E	S	P	E	P	R	O	L	A
O	E	B	S	T	I	N	A	O	K	A	J
L	A	R	P	A	C	I	N	E	N	C	O
J	E	N	P	E	S	T	O	M	A	T	O
T	A	S	L	O	A	S	I	G	N	O	V
J	P	E	R	K	M	I	E	S	P	O	O
M	T	E	N	C	O	O	N	I	P	A	Ŝ
A	O	P	O	S	T	R	P	A	Ŝ	O	P
I	O	S	T	L	O	A	N	G	A	L	A
Z	B	O	R	O	A	N	T	I	N	G	O
O	S	L	A	C	E	Ĝ	L	O	N	E	N
G	L	O	R	F	R	O	M	A	Ĝ	O	O

Trovu la nomon de 7 manĝaĵoj. La ne-uzitaj literoj ebligos legi belegan strofon de zamenhofa poemo.

La nomoj de la manĝaĵoj aperas laŭ kiu ajn direkto.



EKSTERORDINARA ĜENERALA ASEMBLE

En la urbo Malago la 4-an de januaro 2010 je la 18:00 horo, renkontiĝas ĉe la Lernejo "Al Andalus", la Ĝenerala Asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Ĉeestas 15 membroj de la asocio sub la prezidanteco de S-ro Angel Arquillos López, kiel sekretario agadas ĉi-momente S-ro Angel Robles Mata, pro ne-ĉeesto de la sekretario de la asocio.

TAGORDO:

1) La Sekretario legas la protokolon de la ĝenerala asembleo okazita la 12-an de januaro 2008. La ĉeestantoj aprobas ĝin unuanime.

2) La kasistino prezentas la jar-bilancon de la jaro 2008:
Enspezoj: 698,14 eŭroj.
Elspezoj: 833,86 "

Fina Bilanco: - 135,72 eŭroj

Entute la asocio disponas pri 5.999,64 eŭroj. La kasistino informas pri la membroj kiuj jam pagis la kotizon por la jaro 2009. Oni mencias la fakton, ke 4 membroj pagis sian kotizon (entute 98 eŭroj), tamen estas tute ne-eble koni la nomojn, ĉar nek ili nek la banko informis pri tiuj datumoj.

Ankaŭ oni decidas prokrastigi la buĝeton de la jaro 2009 por la kuranta 2010.

3) La prezidanto komunikas, ke la nuntempaj estraranoj jam atingis la du-jaran periodon. Do, laŭ la statuto de la asocio, estas necese nomumi novan estraron aŭ renomumi la nuntempajn estraranojn. Okazas balotado inter la ĉeestantoj, kaj oni decidas renomumi la nuntempajn estraranojn por nova du-jara ofic-periodo. Do, la estraro de AEU dum la jaroj 2010 kaj 2011 estos jena:

- Prezidanto: Ángel Arquillos López
- Sekretario: Julio Herrero Segura
- Kasistino: Mª Dolores Torres Mateo
- Voĉdonanto pri Propagando: José Mª Rodríguez Hernández

4) Kursoj de la internacia lingvo: oni informas al la ĉeestantoj pri la kursoj okazintaj dum la jaro 2009 en Andaluzio. Do, oni organizis kursojn de esperanto en Kadizo, Sevilo, Malago, Velez-Malaga kaj Onubo. Elstarindas ankaŭ la seminario pri esperantologio organizita en Malago de la Kulturo Centro Esperantista de Svisio.

O DE ANDALUZIA ESPERANTO – UNUIĜO

Pri la ceteraj kursoj ne eblas informo, pro la fakto ke oni ricevis neniun sciigon fare de la organizantaj grupoj aŭ asocioj.

5) Andaluza Kongreso de Esperanto: la kasistino prezentis detalan informon pri la elspezoj kaj enspezoj de la 14-a Andaluza Kongreso de Esperanto, organizita kune kun la Hispana Kongreso de Esperanto pasintjare en Malago.

Pri la Andaluza Kongreso de Esperanto de la kuranta jaro 2010, oni sciigas, ke nia samideano Jordi Lietor de Jaeno, proponis la urbon Jaenon kiel sidejon de la 15-a Andaluza Kongreso de Esperanto, kiu okazus verŝajne la tagoj 22-a / 24-a de oktobro 2010-a kaj kies sidejo probable estos la Junulara Gastejo de Jaeno. Unuanime oni akceptas tiun proponon kaj oni invitas ĉiujn membrojn de la asocio kunlabori kaj ĉeesti la kongreson.

6) Demandoj kaj Proponoj:

- Oni elstaras la urĝan neceson solvi la afero pri la TTT-paĝo de nia asocio www.esperantoandalucia.org kiu de antaŭ kelke da tempo misfunkcias, ĉefe pro la abundo de spamoj. Eble pro tio malmultaj membroj de la asocio kunlaboras en la redaktado de artikoloj por la TTT-paĝo, kaj tiuj senditaj ne aperas. Kelkaj ĉeestantoj proponas krei novan paĝon, aliaj proponas malfermi blogon ĉe Ipernity. La kasistino informas pri la fakto, ke la uzo de la ttt-paĝo jam estas pagita ĝis novembro 2010-a, do estus konvene plibonigi ĝin anstataŭ malaperigi servon jam pagita. Oni petas al Sekretario, Julio Herrero, kontakti kun la respondeculoj de la TTT-paĝo (Pablo Foche kaj David Rodríguez).

- José María Rodríguez, voĉdonanto pri propagando de AEU, informas pri la kontaktoj kun membro de UJSARIIO (la junulara sekcio de la Fronto Polisario, organizo reprezentanta la sahara popolo). Tiel, oni provizos kelkajn kulturajn centroj de rifuĝejoj ĉe la sahara dezerto per libro-metodoj esperanto/araba lingvo kaj vortaroj araba/esperanto.

- Ene de la kampanjo "Esperanto en la Publikaj Bibliotekoj de Andaluzio" oni legas informon redaktita de José María Rodríguez pri la demarŝoj plenumitaj. Tiel, oni sciigas, ke AEU sendas dum la kuranta monato libro-metodojn en la jenajn publikajn bibliotekojn de la provinco Kadizo: Alcalá del Valle, Algeciras, Arcos de la Fronera, Castellar de la Frontera, Chiclana, Chipiona, Conil, Jerez de la Frontera, Jimena de la Frontera, La Línea de la Concepción, Los Barrios, Medina Sidonia, Olvera, Prado del Rey, Puerto Real, El Puerto de Santa María, Puerto Serrano, Rota, San Fernando, Sanlucar de Barrameda, San Roque,

Tarifa kaj Trebujena. La partoprenantoj dankas al la vokalo pri propagando pro la agado plenumita kadre de ĉi tiu kampanjo.

Kaj je la 19:40 horo finiĝas la eksterordinara ĝenerala asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

La provizora sekretario

Ángel Robles Mata

La Prezidanto

Ángel Arquillos López

Por kontakti kun la Esperanto-Movado en Andaluzio, bv. uzi jenajn elektronikajn adresojn:

- ✓ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
  aeu @ esperantoandalucia.org
- ✓ Esperanto-Klubo Aksarkio (Vélez Malaga)
  axarquia @ esperantoandalucia.org
- ✓ Jaena Esperanto-Asocio
  jaen @ esperantoandalucia.org
- ✓ Esperanto el Kadizo
  cadiz @ esperantoandalucia.org
- ✓ Kordova Esperanto-Asocio
  cordoba @ esperantoandalucia.org
- ✓ Malaga Esperanto-Asocio "Marbordo de la Suno"
  malaga @ esperantoandalucia.org
- ✓ Onuba Esperanto-Asocio
  huelva @ esperantoandalucia.org
- ✓ Asociación Sevillana de Esperanto
  info @ esperantosevilla.org
- ✓ Bulteno "Monate ĉe Vi"
  angelarquillos @gmail.com
- ✓ Revuo "Gazeto Andaluzia"
  esperanto14 @ono.com

NOVA LIBRO ELDONITA EN HISPANIO
"Cronicas del movimiento obrero esperantista"

de Antonio Marco Botella

Ĵus aperis la libro "Cronicas del Movimiento Esperantista", kies aŭtoro estas Antonio Marco Botella. Temas pri la hispanlingva versio de la jam eldonita esperantlingva "Laboristaj Kronikoj" kun novaj aldonoj. La libron eldonis la laborista E-asocio "Izquierda y Esperanto" kun la monapogo de Fundación Esperanto.



Nuntempe, kiam oni parolas pri la "historia memoro" de tiuj kiuj luktis favore al la Respubliko kaj post la intercivitana milito devis ekziliiĝi fore de Hispanio aŭ suferi la punojn de la diktadora povo dum 40 jaroj, estas necese diskonigi kaj elstari la agadojn de tiuj kiuj luktis cele al la plibonigo de la socio, kaj do de la mondo mem, surbaze al la disvastigo kaj utiligado de nia internacia lingvo. Antonio Marco Botella, la aŭtoro, apartenas al tiu generacio, li mem suferis ekziliiĝon en Alĝerio post la milito tamen li neniam ĉesis labori en la disvastigo de esperanto kaj esperantismo.

La aŭtoro parolas pri lia devo atesti pri tiuj eventoj, pro la fakto, ke verkaĵoj temantaj pri la hispana intercivitana milito abundas, tamen neniu el ili rakontas konkrete la viverojn de la geesperantistoj dum tiuj jaroj. Tiuj viveroj estas sendube ligitaj al la disvolviĝo de la laborista esperantista movado en Hispanio. Oni devas elstari la biografiajn konitaĵojn aperintaj en la libro de signifoplenaj esperantistoj, kiel Julio Mangada, Hernández Lahuerta, Francisco Azorín, Cayetano Redondo, kaj aliaj. Kiel diras la aŭtoro temas nek pri mitoj nek pri herooj, sed pri normalaj personoj, pacemaj idealistoj tamen ĉirkaŭigitaj dum tiuj jaroj de perforto kaj morto.

La laboristaj esperantistoj ne enkadriĝis ĉe unusola politika grupo, do, troviĝas samideanoj en la anarkisma, socialisma kaj komunisma politika movado, tamen preskaŭ ĉiuj ili apartenis al SAT, la sennacieca esperantista grupo kiu forte enradikiĝis ĉe la laboristaj internaciaj asocioj. Tamen, temis neniam pri

homogenea grupo.La verkaĵo estas vera juvelo, eldonis ĝin la "Asociación Izquierda y Esperanto SAT-en Hispanio", la grupo reprezentanta nuntempe en Hispanio de tiu historia SAT, kie laboristaj gesamideanoj de malsimilaj tendencoj komprenis, ke Esperanto estas rimedo de la internacia proletaro por eviti la eksplotuadon bazita sur la nekompreno de la laboristoj de malsimilaj landoj. Do, temas pri leginda libro, kiun oni konsilas aĉeti por koni pli bone la preskaŭ nekonatan rolon ludita en Hispanio de la esperantista laboristaro.

Se al Vi interesas ĉi tiun verkon bv. viziti jenan libro-servon:

http://www.nodo50.org/esperanto/libroservo.htm

PROKSIMAJ ESPERANTO-KONGRESOJ

- **69-a Hispana Kongreso de Esperanto.**
  Santiago de Compostela, de la 2-a ĝis la 6-a de julio.
  Informo: http://www.galegio.org/2010/02ciuj-vojoj-kondukas-al-Santiago/

- **43-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.** Havano (Kubo), de la 11-a ĝis la 17-a de julio.
  Informo: http://www.ilei.info/agado/Kubo.php

- **95-a Universala Kongreso de Esperanto.**
  Havano (Kubo), de la 17-a ĝis la 24-a de julio.
  Informo: http://www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html.

- **66-a Internacia Junulara Kongreso.**
  Santa Cruz del Norte (Kubo), de la 24-a ĝis la 31-a de julio.
  Informo: http://www.tejo.org/ijk/2010/

- **15-a Andaluza Kongreso de Esperanto.**
  Jaén, la 30-an kaj 31-an de oktobro.
  Informo: aeu@esperantoandalucia.org

Lingva Angulo

La prepozicio ĈE

Kiam el la kastilia lingvo oni lernas esperanton oni ekkonas novan prepozicion, kiu tradicie estas tradukata kiel *"en casa de"*. Temas pri la prepozicio "ĉe". Tamen ĉi tiu prepozicio ja ekzistas en la andaluza dialekto, tiel estas eble trovi en la andaluza parol-maniero esprimoj kiel *"encá"* aŭ "*case*".

Tamen, ĉi tiu senco ne estas la sola atribuita al ĉi tiu prepozicio, ĉar ĝi ne nur indikas, ke io/iu troviĝas en ies domo aŭ hejmo, sed ĝi ankaŭ esprimas la ĝeneralan ideon de senpera tuŝeco. Do, ni vidu kiamaniere oni uzas ĉi tiun prepozicion.

- Se oni parolas pri spaco *ĉe* estas uzata en la jenaj sencoj:
  1) tuŝa proksimeco: *ŝi sidas ĉe tablo (ella se sienta a la mesa).*
  ili estas ĉe la piedo de monto (él está a los pies de la montaña).
  2) tradicia sento de "esti en la hejmo, en la domo de...":
  li loĝas ĉe siaj gepatroj (él vive en casa de sus padres).
  3) En la firmo, metiejo, institucio de...
  Oni lin nomis instruisto ĉe nacia lernejo (Se le nombró maestro de escuela nacional).
  La libro aperis ĉe la eldonejo X (El libro apareció en la editorial X).
  4) Metafore:
  Li ploris ĉe glaso da biero (Él lloró junto a un vaso de cerveza).

- Se oni parolas pri tempo, *ĉe* utilas por indiki koincidon inter ago kaj okaza cirkonstanco:

  Li aperis ĉe la koka krio (Él apareció -a la hora / cuando- el canto del gallo.).
  "Murdisto", kriis la viktimo ĉe ĉiu frapo ("Asesino", gritó la victima a cada golpe)

- Se oni parolas pri kondiĉoj, *ĉe* indikas striktan ligitecon inter ago kaj okaza cirkonstanco:

  Li ridis ĉe mia malfeliĉo (El se reía por mi desgracia)
  Ĉe tiu malsano estas tre malmulte da danĝero (Hay muy poco peligro por esa enfermedad).

- Se oni parolas pri statmaniero, ĉe informas pri kiamaniere oni faras ion:

  Mi dormas ĉe malfermitaj fenestroj (yo duermo con las ventanas abiertas).
  La lerta matematikisto kapablas kalkuli milionojn ĉe rapida kalkulado. (El matemático hábil es capaz de calcular millones con una operación rápida).

- Ankaŭ oni povas esprimi per la uzo de ĉe iaspecan koncedon:

  Ĉe ĉiuj liaj krimoj li estas konsiderata kiel sanktulo (A pesar de todos sus crímenes está considerado como un santo). Ĉi-foje estas eble uzi ankaŭ "malgraŭ".... *Malgraŭ liaj krimoj li estas konsiderata kiel sanktulo.*


Ĉu oni devas/povas uzi *ĉe + akuzativo*? En pluraj uzoj *ĉe* montras pozicion, do estas eble meti post ĝi la akuzativon de movo.
Ekzemple: *mi iras ĉe la dentiston* (Voy al dentista)

Fine estas necese substreki, ke la prepozicio *ĉe* ankaŭ povas deveni prefikson kun la senco indiki "kompleta proksimeco". Ekzemple la tre uzata verbo *ĉeesti*: *mi ĉeestis la kongreson (yo asistí al congreso).* Tiel, oni diras, ke mi estis, kun la senco "esti tute proksima" en la kongreso. La akuzativo uzata en *kongreson* indikas, ke mi moviĝis por iri tien. Ankaŭ utilas kiel prefikso en *ĉemane* (*a la mano),* ĝi indikas, ke io estas tute proksima al mia mano, ekz: *se vi planas ripari la maŝinon tenu ĉemane la ilaron. (Si planeas reparar la máquina ten a mano las herramientas).*

Ni bonvenigas ĉi novan sekcion de nia revuo, kie oni pruvos diskonigi kiamaniere plibonigi nian konon de la internacia lingvo. Kompreneble, ni estas tute malfermitaj je Viaj demandoj kaj proponoj. Nian adreson Vi jam konas:

Revuo GAZETO ANDALUZIA *por Lingva Angulo.*
esperanto14 @ ono. com

Andaluza Kuirarto



ORANĜO KUN OLEO KAJ GADO

La andaluzaj receptoj ĉi tie prezentitaj, krom bongustaj, ofte estas facile realigeblaj. Hodiaŭ ni prezentas recepton kun ambaŭ karakteroj, do oni povas prepari ĝin post kelkaj minutoj kun malmultaj ingredientoj kaj krome, la fina rezulto estas delica. Eble pro tio ekzistas duboj kvalifiki ĉi tiun recepton kiel deserton, kiel entreon aŭ kiel ĉefan manĝaĵon. Temas pri oranĝo kun oleo kaj gado. Gado estas seka kaj salita moruo.

Ingredientoj

- 3 oranĝoj.
- ½ kilogramo da gado.
- 2 cepoj.
- Oliv-oleo.

Ellaborado


Senŝeligu la oranĝojn kaj tranĉu ilin laŭ segmentoj. Aldonu la gapon tranĉita laŭ strioj kaj la cepon ankaŭ tranĉita tiel. Sur la tutaĵo versu la oliv-oleon. Oni povas versi ankaŭ sur la tutaĵo oranĝ-sukon, eblas ankaŭ aldoni kelkajn nigrajn olivojn.

Jam estas preparita bongusta kaj freŝa manĝaĵo taŭga por la someraj vesperoj.


Malgranda Kuireja Vortaro




Forko



Tranĉilo



Kulero




Ĉerpilo

Telero
(plata telero)



Poto

Telero
(supa telero)



Pato

Internaciaj Esperanto-Asocioj

RONDO FAMILIA

Rondo Familia fondiĝis en la jaro 1994, ĝuste dum la Internacia Jaro de Familio, por ligi esperantistajn familiojn. Al ĝi rajtas aparteni familiojn, kun aŭ sen infanoj, kaj tute sendepende de ilia movada engaĝiĝo. Preskaŭ ĉiuj familioj membroj de ĉi tiu asocio reprezentas la mezan generacion de la nuntempa esperantista movado, tio estas, la patroj ne estas tre maljunaj kaj ili havas ankoraŭ ne tre aĝajn infanojn, temas pri la movada generacio troviĝanta inter la junularo kaj la pli aĝa generacio, do ĝi konsistigas la plejparton de la esperantista movado.

Ekzistas renkontiĝoj specife organizataj por esperanto-familioj, inter ili la plej kontataj estas la Renkontiĝo de Esperanto-Familioj, kie ofte ĉeestas proksimume 100 gepartoprenantoj ĉi-jare organizota dumsomere en Kroatio. Ĉi tiu ne-formala renkontiĝo kutime estas bona maniero kontaktigi al tiuj infanoj kaj familioj kiuj estas denaske esperanto-parolantaj kaj por havigi al ili pli da okazoj taŭgaj por sperti esperanton en internacia etoso.

La oficiala organo de la asocio estas la ne-regula cirkulaĵo FAMILIA ESPERANTO, eldonita surrete kaj elirebla al ĉiuj interesitoj, do senpaga, vizitantaj jenan adreson: http://www.uea.org/rondo_familia/

Elstarebla ankaŭ la eldonado de la libro "Hejma Vortaro", kies version en interreto estas senpage alirebla. La eldonado de ĉi tiu libro ne apartenas rekte al la asocio, tamen ĝi estas iniciato de gravaj RF-anoj, kiel la fina Jouko Lindstdet aŭ la israela Amri Wandel. Temas pri vortareto de hejmaĵoj en Esperanto, kie aperas preskaŭ 600 nomoj de ĉiutagaj aferoj kun difino kaj ekvivalentoj en diversajn naciaj lingvoj. Tiu vortaro celas helpi tiujn parolantoj de Esperanto, kiuj uzas la lingvon hejme kiel ĉiutagan komunikilon.

Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ni metas je la dispono de la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jenajn verkojn eldonitaj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

PLATERO KAJ MI



Temas pri la plej fama verkaĵo de J.R. Jiménez, sinsekvo de poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, kune kun lia azeno Platero, lirike priskribas la sunoplenan vilaĝon Moguer, ties homojn kaj ties pejzaĝon. Tradukis Miguel Gutiérrez Adúriz.

Prezo: 8 eŭroj

SANGA NUPTO

Unu el la plej konataj verkoj de Federico García Lorca. Unika sintezo de muziko, plastiko, scenografio, prozo kaj verso, konstituis la restarigon de la pura tragedio sur la hispanaj scenejoj. Ĝia intrigo okazas en vilaĝeto de la provinco Almerio, dum nupta ceremonio.
Tradukis: Miguel Fernández

Prezo: 6 eŭroj





APUD CENTJARA OLIV-ARBO
JUNTO A UN OLIVO CENTENARIO

Libro omaĝe al nia jaena samideano Alfonso Escamilla Roa (1912-2007), la plej veterana andaluza esperantisto. Ene de la libro aperas eseoj de diversaj aŭtoroj pri edukacio, esperanto, Pegalajar, Linares kaj Jaén. Ankaŭ aperas esperantista mem-biografio de S-ro. Escamilla kaj kelkaj fotografaĵoj.

Prezo: 5 eŭroj

Aĉetu ĉi tiujn librojn eldonitaj en esperanto en Andaluzio.
Kontaktu kun:
aeu @ esperantoandalucia.org
cordoba @ esperantoandalucia.org

Turismi en ... AYAMONTE


Okcidente de Andaluzio, en la onuba provinco, tuj apud la portugala landlimo, troviĝas belega urbo, kun tarŝiŝa origino kaj amerika projekciado, sed tute andaluza: *Ayamonte*.

Historio:

Oni ne konas ekzakte la originon de la vilaĝo Ayamonte. Verŝajne la nomo devenas de la supozita ibera vorto *"aya"*, kies signifo estus "monto". Laŭdire la iberoj establis sin ĉe la enfluejo de la rivero Gvadiano, ĝuste kie oni troviĝas nun la urbo. Post la iberoj alvenis la tarŝiŝanoj kaj post ili la romianoj, kiuj nomis la lokon *Aya Montis*, aŭ Monto Aya, la haveno de la urbo, konata de la romianoj kiel *Ostium Fluminis Anae* (la pordoj de la rivero Ana), estis tre uzata en la komerco de la Romia Imperio.

La romianoj alvenis en la jaro 200 a.K. kaj ekspluatis la riĉajn kuprajn minejon de la zono. Post ili neniu restaĵo de la islama regado de la urbo troveblas. Nur oni scias, ke en la jaro 1240 la portugala kavaliro Paio Peres Correia konkeris la urbon, tiam regata de la granada militestro Jusuf.

Pro la fakto, ke la vilaĝo estis konkerita de portugala kavaliro sed donacita de la portugala reĝo al la milit-ordeno *Santiago*, dependanta de la kastilia reĝo, komenciĝis luktoj inter portugaloj kaj kastilianoj en Ayamonte kaj ĝia ĉirkaŭaĵoj, kvereloj kiuj finiĝis E en la jaro 1335 ekde kiam Ayamonte definitive apartenis al la kastilia regno.



Blazono de AYAMONTE

Post la eltrovo kaj konkero de la amerika kontinento la vilaĝo akiris grandan riĉecon, ĉefe pro ĝia haveno kaj la komercaj vojoj inter Eŭropo kaj Ameriko, kaj tiel en la jarcentoj 16a kaj 17a Ayamonte estis la plej grava vilaĝo en la onuba provinco. En la 17a jarcento la Markizo de Ayamonte, reganto de la urbo nome de la kastilia reĝo, sekrete apogis ribelon kontraŭ Kastilio favore al sendependiĝo de nova andaluza regno. La ribelo malsukcesis kaj la kastilia reĝo kaj ordonis ekzekuti la markizon, kiu mortis senkapigita en la jaro 1648.

Komence de la 19-a jarcento kaj okaze de la napoleona invado de la


Ibera Duoninsulo la Nacia Defenda Komitato kreita en Sevilo devis fuĝi en *Ayamonte-n*.

En la 20-a jarcento Ayamonte pligrandiĝis kaj moderniĝis. La urbo disvolviĝis dank'al la turismo kaj al la fiŝ-industrio. Nuntempe, post la konstruo de la internacia ponto super la Gvadiana rivero inter Hispanio kaj Portugalio, Ayamonte estas strategia loko por la turismo kaj la komunikacioj.

Monumentoj

- **Kastelo de Ayamonte**


Laŭdire la unua konstruo de ĉi tiu fortreso ŝuldiĝis al la romianoj. Tutcerte oni rekonstruis ĝin dum la 13-a jarcento post la kristana konkero de la vilaĝo. Estis necese por la kastilia armeo disponi je sufiĉe grava kastelo en Ayamonte por eviti la portugalajn pretendojn okupi la zonon. Pro la lisbona tertremo de la jaro 1755 estis necese rekonstrui ĝin denove. En la jaro 1966 oni konstruis tie altkvalitan hotelon ankoraŭ funkcianta.



Kastelo de Ayamonte, nunempa hotelo

- **Palaco de la Markizo de Ayamonte**

Starigita komence de la 17-a jarcento de Manuel Silvestre de Guzman, Markizo de Ayamonte. En la enira faŝado, super la pordo, nur restas nun la markiza krono de la blazono de la Markizo de Ayamonte. La blazono estis detruata post la ekzekuto de la Markizo de Ayamonte, punita de la reĝo pro lia pretendo sendependigi Andaluzion.



- **Internacia Ponto super la rivero Gvadiano.**

Konstruita en la jaro 1991 dank'al internacia akordo inter Hispanio kaj Portugalio. Ĝi komunikas la portugalan urbon Castro Marim kaj Ayamonte. Tricent personoj laboris dum kvar jaroj por starigi ĝin. Ĝi mezuras 666 metrojn.

- **Preĝejo Nia Sinjorino de Angustias**

Starigita en la 16-a jarcento tuj apud la rivero Gvadiano. Oni konstruis ĝin por gardi la religian

figuron de Nia Sinjorino de Angustias, patronino de la urbo. La lisbona tertremo de la jaro 1755 detruis grandan parton de la origina preĝejo.

- **Urbodomo**

La originan konstruaĵon oni starigis dum la 18-a jarcento. Temas pri tipa konstruaĵo de tiuj elmigrintoj revenintaj el Ameriko kun granda riĉeco. Ĝi posedas centran endoman korton kaj belega ŝtuparo. Multnombraj azulehoj ornamas ĝin.



- **Defenda Murego de Nia Sinjorino de Angustias**

Temas pri defenda murego kiu dum la historio de Ayamonte ludis gravan rolon por eviti la portugalajn atakojn al la urbo. Troviĝas apud la rivero Gvadiano. Bedaŭrinde restas nuntempe nur malgranda parto de la murego. Rekonstruita en la jaro 1999.

- **Romia Maŭzoleo en *Punta del Moral***

Temas pri romia tombejo kaj verŝajne ankaŭ pekl-industrio. Oni konstruis ĝin dum la 4-a jarcento p.K.


Tipaj Manĝaĵoj

La kuir-arto en Ayamonte baziĝas sur la maraj produktoj, kiel la blankaj salikokoj, kvankam ankaŭ ekzistas manĝaĵoj ellaboritaj kun legomoj kaj porkaĵoj el la apuda zono *Jabugo*. Ankaŭ estas grava la portugala influo, ĉefe dum la pasinta jarcento, kiam kelkaj portugalaj produktoj trapasis la apudan landlimon. Jen kelkaj ekzemploj de tipaj manĝaĵoj en Ayamonte.

La Rizo kun Maronoj, temas pri manĝaĵo kun portugala influo. La maronoj abundas ĉe la apuda Portugalio. Ĝi estas supo farita el rizo kaj maronoj kie la citrono kaj la cinamo donas specialana guston.

La Rajo kun Papriko, rajo estas fiŝo kaptita ĉe la zono. Kiel en ĉiu andaluza marbordo la kuir-arto unuigas la fiŝojn kaj la oliv-oleon, ankaŭ ĉi tie en Ayamonte en ĉi tiu bongusta manĝaĵo.

La labrako je la *Ayamonte* stilo, temas pri delica maniero prepari la fiŝon nomita "labrako". Ĉi foje farĉita kun la fama ibera ŝinko, ankaŭ produktata en la andaluza provinco Onubo.



Salikokoj. Mara delicaĵo en Ayamonte

Tipaj Festoj

Ayamonte estas marista urbo, do la 16-a de julio oni festas tie, kiel tra la tuta andaluza marbordo, la feston de la *Virgen del Carmen*. En la kvartalo Canela, la zono plej apuda al la maro en Ayamonte, la maristoj portas la religian figuron de la Virgulino surŝultre kaj ili eĉ eniras en la riveron survoje al la preĝejo.




Preĝejo *El Salvador* en Ayamonte

En la monato novembro oni memoras la Sanktulon Diego de Alcala, patrono de Ayamote. La 13-an de novembro oni disdonas al ĉiuj partoprenantoj en la festo la ringan panon de Sankta Diego, tre simpla manĝaĵo simila al pano, disdonita memore al la bonfaraj agadoj plenumitaj de la sanktulo al la malsanuloj en Ayamonte dum la 15-a jarcento.

La 23-an de junio, dum la nokto de Sankta Johano, oni ekbruligas ĝojfajrojn sur la plaĝo. Temas pri la tradiciaj *"quema de juanillos"* (bruligo de juanillos –ĉja formo de Johano-). Verŝajne estas la sola nemediteranea zono kie ĉi tiu festo okazas.

En Septembro okazas la festoj de la Virgulino de *Angustias*, temas pri tradicia andaluza festo, kiu komenciĝas kiam muzik-bando alvenas en la vilaĝoj per ŝipo tra la Gvadiana rivero.




Ayamonte el aera vidpunkto. Fronte al ĝi la portugala urbo Vila Real.

Venontnumere....

HUERCAL OVERA (Almerio)

Belega strat-angulo en Ayamonte




Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Fantomoj en Kordovo

"Kordovo estas urbo kie abundas la paranormalaj fenomenoj", tion asertis la aŭtoro de la ĵus publikigita libro "Guía Secreta de la Córdoba Misteriosa" (Sekreta Gvidlibro de la Mistera Kordovo). Tiu libro rakontas paranormalajn okazintaĵojn en la provinco Kordovo. La libro komenciĝas pere de historio okazanta en la konstruaĵo kie nun troviĝas la Fakultato pri Juro de Kordovo. Pro la fakto, ke mi mem studis dum 4 jaroj en tiu Fakultato, do en tiu konstruaĵo, la rakonto ja altiris mian atenton.

La konstruaĵo kie nun troviĝas la Fakultato pri Juro en Kordovo stariĝis en la 16-a jarcento, unuamomente ĝi estis monaĥejo de la karmela ordeno, ankoraŭ hodiaŭ troviĝas apude preĝejo de tiu religia ordeno. Dum la hispana civila milito (1936/1939) ĝi utilis kiel hospitalo por vunditaj militistoj kaj post tio kiel akuŝ-hospitalo. Ekde la oka jardeko de la pasinta jarcento tie troviĝas la Fakultato pri Juro de la Universitato de Kordovo.

Ekzistas kelkaj versioj pri paranormalaj aperoj en la koridoroj de la Fakultato. Sur la libro aperas rakonto pri purigistino laboranta dumnokte okaze de varma tago. Subite la temperaturo faliĝis kaj ŝi skuetiĝis. Fine de la koridoro la purigistino vidis virinon en longa blanka nokto-ĉemizo, similа al tiuj



Korto de la Fakultato pri Juro en Kordovo

uzataj ĉe la hospitaloj, la vestaĵo makulita per sango. Laŭdire la fantoma virino ploregis pro la morto de sia ĵus-naskita filo. Kompreneble la purigistino tuj forkuris.

Necesas diri, ke inter la jaro 1940 kaj 1970 la nuna Fakultato utilis kiel akuŝ-hospitalo, kie naskiĝis miloj da infanoj, kaj kie kompreneble kelkaj el ili mortis. Kiel dirite mi mem studis en tiu Fakultato dum 4 jaroj (1983-1987), de tiuj jaroj mi memoras, ke neniu studanto deziris resti sola je nokta horo en la koridoroj aŭ en la klas-ĉambroj, oni parolis nek pri fantomoj, nek pri paranormalaj okazintaĵoj, tamen neniu deziris resti tute sola tie. Mi memoras pri profesoro loĝanta en Madrido sed instruanta en la Fakultato en Kordovo. Li ne ĉeestis la Fakultaton ĉiutage, sed ja almenaŭ du-trifoje en la semajno. Ĉar tiutempe ne ekzistis rapida trajno inter ambaŭ urboj, por iri de Madrido en Kordovon li vojaĝis pere de matena

aviadilo, tamen la flugo arivis en Kordovon tro frue, do kiam li alvenis en la Fakultato ankoraŭ estis tie nek aliaj profesoroj nek lernantoj. Laŭ rakontis ĉi tiu profesoro mem, iam li vidis ion stranga ĉe koridoro je frua horo, ĝi aspektis kiel virino, kvankam li ne havis sufiĉan tempon por eltrovi ĝin ĉar la timo igis lin forkuri. Ekde tiam li jam ne plu venis en la Fakultaton je tia frua horo.

j.m.r.h.

Humoro



POEZIO

2010, jarcento de la naskiĝo de Miguel Hernández.-

Luliloj de la cepo

Cepo estas prujno
fermata kaj malriĉa.
Prujno de viaj tagoj
kaj de miaj noktoj.
Malsato kaj cepo,
nigra glacio kaj prujno
granda kaj ronda.

En la lulilo de malsato
mia infano estis.
Per sango de cepo
Li mamnutris sin.
Sed via sango
prujna per sukero,
cepo kaj malsato.

Bruna virino
decida en luno,
disverŝas sin
fadeno post fadeno
sur la lulilon.
Ekridu, infano,
ĉar mi alportas al vi la lunon
kiam tio taŭgas.

Alaŭdo de mia hejmo,
ridu multe.
Estas via rido sur viaj okuloj
lumo de la mondo.
Ridu tiom,
ke mia animo aŭdante vin
ekbatu la spacon.

Via rido faras min libera,
metas sur mi flugilojn.
Ĝi solecojn deprenas de mi,
malliberejon el mi eltiras.
Buŝo kiu flugas,
koko kiu sur viaj lipoj
ekflumas.

Estas via rido la glavo
plej triumfanta,
venkisto de la floroj
kaj la alaŭdoj.
Konkuranto de la suno.
Estonteco de miaj ostoj
kaj de mia amo.

La karno dezirante flugi,
subita la palpebro,
la vivado pli ol iam ajn
kolora.
Kiom da kardeloj
deflugas, movante siajn flugilojn,
de via korpo!

Mi vekiĝis pri esti infano:
neniam vekiĝu.
Trista estas mia buŝo:
ridu ĉiam.
Ĉiam en la lulilo,
defendante la ridon
plumo post plumo.

Estaĵo de flugado tiel alta,
tiel vasta,
ke via karno estas la ĉielo
ĵus naskiĝinta.
Se mi povus alflugi al la komenco
de via kurado!

La okan monaton vi ridas
per kvin oranĝofloroj.
Per kvin etaj
krueloj.
Per kvin dentoj
kiel kvin jasmenoj
junaj.

Limo de la kisoj
ili estos morgaŭ,
kiam en via dentaro
vi sentos armilo.
Vi sentos fajro
kuri malsupren
Serĉante la centron.

Flugu, infano, sur la duobla
luno de la brusto.
Ĝi trista pro cepo,
vi sata.
Ne falu.
Ne sciu pri kio okazas.

Miguel Hernández
(en esperanton tradukis Miguel Fernández)

"Lulilo j de la cepo" verkita fine de la jaro 1939 ĉe madrida malliberejo kaj dediĉitaj al lia filo, post la ricevo de letero sendita de lia edzino kie ŝi sciigis al la poeto, ke la filo manĝis nur panon kaj cepon.

La proksima numero de *GAZETO ANDALUZIA* aperos fine de la monato majo 2010-a. Nia celo estas reguligi la kvamonatan aperadon de la revuo dum la somero de 2010.

Ĉu Vi deziras kunlabori en la redaktado de la revuo? Se jes, ne dubu sendi al ni Viajn kunlaboraĵojn. Al la Esperanto-Movado en Andaluzio apartenas ni ĉiuj parolantoj kaj simpatiantoj de la internacia lingvo. Do, ni ĉiuj devas surpreni la responson redakti legindan revuon en nia lingvo.

Kontaktu kun ni:
GAZETO ANDALUZIA
esperanto14 @ ono . com

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Sekretario: Julio Herrero Segura
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com


TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.org

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

juan ramón jiménez:
platero kaj mi



hispana literaturo

Eldonita en Andaluzio